
# Jen nia mondo, Leciono 5



## Ĉe la floristo

*(vd. ankaŭ p.31)*

**Demandoj pri la dialogo**

Kie estas Petro kaj Helena? (ĉu hejme? ĉu en aŭto?)
Kion Helena volas aĉeti? Por kiu?
Ĉu ŝia patrino amas plantojn? Kion ŝi amas? Ĉu nur plantojn?
Kion lia patro kutime donas al lia patrino? Kiam?
Kial Helena ne volas aĉeti tulipojn?
Kiaj estas la violoj? Kiaj estas la tigoj? la folioj?
Kiom da violoj Helena aĉetas? Kiu preferas hiacintojn?
En kiu sezono Petro aĉetas blankajn liliojn? … orajn krizantemojn?
En kiu ĉambro la patrino de Petro havas bildon de floroj?
Kiajn bildojn kolektas la patrino de Petro?
Kiom da hiacintoj Helena intencas aĉeti?
Kion ŝi lasis en la aŭto?
Ĉu Petro havas monon?
Ĉu ankaŭ Petro aĉetis florojn?
Kial Helena donas al Petro kison? Ĉu ili eble vizitos la floriston denove?
Kien Helena kaj Petro iras por trinki kafon?
Kion Petro devas fari unue?

### Demandoj pri vi

Ĉu VI ofte aĉetas florojn?
Aŭ ĉu vi plukas florojn en la arbaro? – en via ĝardeno? Ĉu vi havas ĝardenon?
Ĉu la nomoj de la floroj estas malfacilaj? Ĉu ili estas belaj?
Ĉu vi havas bildon pri (de) floroj ?
Ĉu vi amas florojn? – aŭ ĉu vi preferas bildojn de floroj – aŭ de fruktoj?
Ĉu vi uzas aŭton por aĉeti florojn?

<u>Re-ordigu</u>
**fiksi floron al mantelo, trinki kafon, viziti la florbutikon denove, pagi por la floroj, diri: Kiom kostas la floroj?, veni al la butiko, preni monon, rigardi florojn**

<u>Kreu frazojn</u>

MI ofte/kutime/nepre/multe/(mal)rapide/volonte/hezite
    aĉetas florojn/ plukas florojn/ parolas pri floroj/vizitas florbutikon
    aĉetas librojn/ fruktojn/ pomojn/ kukojn/ komputilojn/